
lavebla. En la jaro 1952 la var-marko "perlono" estis leĝe protektita. La tiama "dodoroa (t.e. orienta) parto de Germanujo" poste fabrikis la perlonecan "dederono". Tiu produktaĵo atingis specialan famon per fabrikado de kitelo-antaŭtukoj kaj butikumaj saketoj. Tiuj lastaj estis tiom solidaj kaj fortikaj, ke ili ankoraŭ hodiaŭtempe – en koloro ruĝa/blanka – estas vendataj en ostalgiaj* butikoj. (2010-01-29)

* vortlude formita el "o(rient-no)stalgiaj" laŭ la germana *"ost"* = oriento.

## Kial birdogenuoj staras malantaŭdirekten?

Vere aspektas kvazaŭ la "genuo" de birdoj – kontraŭe al ĉe mamuloj – fleksiĝas malantaŭdirekten. Sed tio trompe erarigas. Ĉar tio, kio ŝajnas esti genuo fakte estas parto de la piedo.



Do: birdo saltetas, paŝas kaj staras sur siaj ungoj, kiuj estas konformaj al la piedfingroj de mamuloj. Birdoj iras piedfingre. La "kruroj" de birdo sekve kompareblas al niaj piedaj plando kaj surpieda instepo, la pieda dorso. Kaj la "genuo" de birdo egalas, ĉe mamuloj, al ties kalkano kaj tarsa artiko. Certe ankaŭ birdoj havas verajn genuojn. Sed tiuj troviĝas tute supre de la gamboj kaj plej ofte estas kovritaj de plumoj. (2010-07-31/08-01)

## Orela kreskado

"Avinjo, kial vi havas tiom grandajn orelojn?" Ankaŭ se ne la lupo sed la avino mem estus kuŝinta en la lito, la demando de ruĝĉapulineto ne estus ĝentila tamen tute prava. Ja estas fakto, ke en la maljunuleco la oreloj ĉiam pli kaj pli grandiĝas. Dum tempoperiodo de 5 jaroj la orelkonko kreskas je 1 milimetro – ĉe olduloj do kolektiĝas bela kvanto. Sed plukreskas sole la ekstera konko, la interna orelo restas vivolonge senŝanĝa – anstataŭe tamen la ekstera orelo egale kreskas eĉ en du direktojn: laŭ la longeco kaj laŭ la larĝeco.

Se nia skeleto dum nia vivo same kreskus kiel niaj oreloj, tiam la averaĝa 80-jaraĝa viro havus altecon de 2,29 metroj. Kaj kial la daŭra orelkreskado? Nu, eble pro tute praktikaj kaŭzoj. Kun pli grandaj aŭdiloj povas esti kompensataj certaj akustikaj mankoj. Avinjo/Lupo do tute prave respondis al la ruĝĉapulina demando. (2010-02-24)



## Papilio de la jaro 2011*

La granda kaj belega arbara papilio *Apatura iris* okulfrapas pro sia violablua ŝanĝiĝanta brilo sur la faco de la nigrabrunaj flugiloj de la masklo. La tipa ŝanĝobrilado, kiu mankas al la femalo, estas kaŭzata de etaj aerveziketoj en la flugilaj skvamoj. La malsupra flanko de la flugiloj estas kaŝtanbruna kun grizaj makuloj kaj posedas oranĝkoloran "okulon" kun malhela nukleo. La malantaŭaj flugiloj havas blankan bendon (kiu nur malofte mankas). Tiu ĉi papilia specio, kies flugila disetendo estas inter 55 kaj 65 mm, havas sian disvastiĝan centron en la meza Eŭropo kaj troviĝas orienten ĝis Ĉinujo kaj Koreujo. Oni trovas ĝin en maldensaj apudriverejoj kaj foliarbaroj kun salikoj. Kiel pariĝa renkontiĝejo servas eksponitaj kverkoj.



**Bildo 1**: La "granda ŝanĝbril-papilio" *Apatura iris*, papilio de la jaro 2011, en la natura grandeco.

La papilio nur malofte estas vidata ĉirkaŭ floroj sed pli ofte sur la tero: ĉe malsekaj surteraj flakoj aŭ veturilvojaj sulkoj, ofte ankaŭ sur freŝa ĉevalosterko. Aliflanke ĝi estas tipa loĝanto de arbopintoj, plej bone observebla de arbosupre pendantaj artefaritaj pontovojetoj. La ŝanĝbrila papilio flugadas ekde meza junio ĝis meze de aŭgusto, precipe dum la varmegaj tagmezaj horoj. La ovojn ĝi demetas (en aŭgusto) unuope sur la folisurfacon de larĝfoliaj salikoj starantaj en lokoj kun altigita atmosfera humido. La folioverdaj raŭpoj fariĝas pli ol 4 cm longaj. Pro siaj du "kap-kornoj" kaj la pinta korpofino ili similas al limakoj. La raŭpoj preferas manĝi sur la "kapra saliko" (*Salix caprea*) ekde aŭgusto, travintras kiel raŭpoj kaj ekzistas nur po unu generacio en jaro. Ili pupiĝas sur la folia malsupro en flanke plataj helverdaj krizalidoj, kiuj, kun siaj flavkoloraj vejnoj kaj elformaĵoj, aspektas kvazaŭ folioj. La krizalida ripozperiodo daŭras nur 2 semajnojn.

En la meza Germanujo (Turingio) la granda ŝanĝbril-papilio ne estas ofta kaj nur malaltnombra. Ĝi apartenas al la familio de la "nobelpapilioj" (*Nymphalidae*) kaj troveblas en la kategorio 3 de la Turingia Ruĝa Listo de endanĝerigitaj specioj. Por ĝia protektado necesas konservado de la mol-lignaĵoj apud ombroriĉaj arbarorandoj kaj la malpermeso dehaki grandajn arbarrande starantajn kverkojn kaj tiel detrui la "papiliajn rendevuejojn". (*hainichland-Magazin* n-ro 21, somero 2011, p.16)

* La germanuja Naturprotekta Unuiĝo *NABU* per la elekto de "Vivaĵo de la Jaro" celas, ke la publiko pli konscience atentigu nian mondon kun ĝia bestoj kaj plantoj.